GISTO, NOV-2006.

G.Otto Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

PLEZUREGO

Nia tre kara Karlo Dionizjo, kiu de multaj jaroj forlasis nin, kutimis diri: nuntempaj gesamideanoj tre felichas chiufoje kiam ili trovas novan amikon, kiu unuopule piochas ie en nia lando. Tio okazis al mi tagdekon antaùe. Nekonata amiko sin anoncis kiel baldaùa vizitanto en mia domo. Mia edzino forgesis la nomon lian kaj ties logxloko..Sxi diris, estas io kun finajxo “mejo”. Sed, kiu estas ties telefonnumero? Mi riskis sendi al li nudan P-Karton adresitan al Esperantisto en Arrojo do Mejo, konfirmante mian adreson. Nu, mi atendu. Antaù ol alveni, li certe anoncigxos. Tion li faris hieraù, 15/11, sed domagxe denove gxuste kiam mi estis eldomigxinta, por cheesti trijarigxan feston de niaurba FM-Radio.Tie mi restis nur kurtan tempon post la tagmangxa kunsido, por esti hejme kaj scivole akcepti la alvenonton. Baldaù haltis rugxa aùto antaù la enirejo che mia domo. Prezentigxis simpatia sinjoro kiun mi alparolis esperante kaj li reciprokis la saluton kaj aldonis: Arno Volkmer, el Arroio do Mejo. Ni intersxangxis librojn kaj babilis. Li montrigxis fervora samideano, eble 50j, poligloto, flugisto. Bedaùrinde li restis dum nur kurta tempo char kompromison li devis plenumi. Versxajne esperantistoj, neniofarantoj, ne ekzistas. Kaj, aldona gxojo: li promesis trinki Verdan Kafon kaj konatigxi kun niaj rondanoj la venontan 25/11. Per iomete da praktikado li farigxos atuto. En la adiaùo li aldiris “Gxis la 25ª!

VINO

Nia londona gaúcho el Lajxeado-RS, Lenio, dum niaj babiladoj pere de EchoLink, asertis ke, brazilaj vinoj certe estas el bonkvalitaj vinberoj sed, miru, ne ricevas importpermeson de la brita registaro. Laù li la enhavo de la boteloj ne korespondas al tio kion la etikedoj asertas. Kaj li konfirmas ke, trovi brazilan vinon tie ne eblas krom se turisto kunportis botelon por sia uso. Kio mankas en nialandaj vinoj? Oni pintigu la orelojn, por eltrovi la kialon.

VETO

Mi insistas kaj persistas en mia propono, ke chiu el nia amikaro faru almenaù unu veton (R$ 1,50) pere de MEGA-SENA, chiusemajne. Jes, ja, mia kara Zaghetto, oni scias: pro tro malfacila ebleco esti trafita far Sinjorino Fortuna, oni rajtas konsideri sin senxanca. Multe pli facilas perdi multajn vetojn sed, fervoraj anoj de nia idealo konsentos ke gxi valoras pli ol R$ 1,50 semajne. Se unu el ni meritos doni pusxegon al Esperantujo, verda koboldo helpos (tre multaj sxuldas al ni kompenson por niaj nevolaj fusxajxoj) kaj brazilanoj farigxos glora lokomotivo kontraù kiu neniu hegemonio eltenos.

RECITADO

Chu neniu konsentis ke, deklami poezion dum E-evento, estas utila rimedo por atentigi najbarajn klientojn pri nia grava lingvo? La tempospacon volontulo tuj plenigu per eta rimaro.

TEXTO

Vi provu, **per dek vortoj**, esperantigi la suban nacilingvan frazon – Só pessoas bem conhecidas têm o direito de entrar para o interior da minha casa.

KRIMA MALPRUDENTO

Súbita manko de elektro okazigis pasintan semajnon internlande de kaivala municipo la morton de kelkmiloj da kokidoj, sufokitaj pro troa varmo en la bredejo. En mia jxurnala kolumno titolita Ekologio, mi intense protestas kontraù tia torturo far monavidaj bredistoj. Neatendite povas okazi elektromanko pro meteologia motivo aù pro grava akcidento kiu faligis kelkajn fostojn plus transformatoron. Tial responsaj bredistoj devas teni surogatan elektrofonton, sxalteblan tuj post kiam okazas bezono. Laù nialanda Konstitucio tiaj homoj kulpas kaj meritas justican kondamnon pro neglekto. Imagu vin fermita, kunpremita en ejo varmega, gxis la lasta spiro!

.....

Sendita de nia karega samideano Enivaldo (BSB), pere de e-mesagxo:

LA MASONISTO

Masonisto, bona profesiulo kaj bonkaraktera persono, decidis emeritigxi. Lia dungisto tre bedaùris perdi ekzemplodonan laboriston. Li riskis peti, ke li plenumu ankoraù unu favoron: konstrui almenaù unu plian domon. La tasko sxangxis lian planon kaj ne plachis al li sed li konsentis. La konstrulaboro tial farigxis iomete senzorga, iomete fusxa. Laboro finita, la dunginto elposxigis la doman sxlosilon kaj enmanigis gxin al la masonisto kaj diris: jen, kiel premio por via servemo, mi donacas al vi vian propran domon. La moralo de chi estorio kondukas nin al la penso pri nia surtera vivovojo kaj ties konsekvencoj.Dankon, al mia radiokolego Eni!

Bonhumuro:

EBRIULOJ

Du amikoj, drinkemuloj, forlasis feston. Ambaù estis ne sufiche sobraj por konvinki policiston ke ili estas ne ebriaj. Estigxas longa diskuto, kiu el ili veturigos hejmen. Post kvaronhoro unu el ili prenis la startigan sxlosilon kaj ili forveturas. Mezvoje, jam je 180km/h la gaja kolego diras: mia kara chi aùto kvazaù flugas, haltu, mi desaltos. Diras la alia – Ne, ne faru tion. Kiu stiras estas vi mem!

Nia diligenta samideano Ennio, el Torres, kontribuis per anekdoto: Mi nomis gxin

DU OPINIOJ – Geedza paro kusxas en la lito dum ilia filino amindumas sur la vizitochambra sofo. Jam malfruas. La patro: - Tiu fripono, malinda ulo, forgesas foriri. Mi iros peti ke li adiaùu pli frue. La patrino – Ho ne! Rememoru la tempon en kiu ni du felichaj amindumis. La patro – Oho...mi estis forgesinta pri tio. Tuj tuj mi foririgos tiun friponon, mi forpelos lin!

GEEDZIGXO

La gefianchoj survoje al la pregxejo suferas krasxon kaj mortas. Alvenintaj en la Chielon la fianchino plendas – Domagxo, sankta Petro, gxuste en mia edzinigxa tago mi devas suferi chi teruran okazintajxon... La fiancho, praktika viro, riskas sugesti – Via mosxto povus iel ripari la perdon realigante nian edzigxan ceremonion tie chi?

SanPetro kompatas, promesas esplori chu troveblas eblecon kaj foriras. Kvin horojn poste li revenis dirante – Mi sukcesis trovi pastron sed estas grava kondicho. La edzigxo estos poreterne...ne ekzistas la alternativo de divorco. Sed...kial? scivolas la fianchino. – Se por trovi pastron chi tie estis malfacila tasko, bildigu al vi trovi advokaton!